

LA JUNIA VIVO

REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(M.H.) NEDERLANDO
ĜIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15V.FR.

MONATA ORGANO
POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LA KVARFOLIA TRIFOLIO.

Tuj apud dezerto loĝis riĉa komercisto, kun la nomo Mansur. Tiu viro sendis ŝipojn, plenaj de komercaĵoj, trans la maro kaj tra la dezerto karavanojn, kaj li iĝis ĉiam pli riĉa. Sed ankaŭ pli kaj pli avara.

Unu afero tamen mankis al li, nome infano. Kio okazos pri liaj riĉaĵoj, kiam li mortos? Tiam fremdaj homoj ĉion profitos. Sed, se li havos infanon, tiu ĉi povos heredi kaj ankoraŭ pliriĉiĝi.

Lia deziro plenumiĝis: li ekhavis filon kaj nomis lin Omar.

En la sama tago naskiĝis ankoraŭ knabo, Abdalah. Tiu malfeliĉa infano tamen malhavis, jam ĉe la naskiĝo, sian patron. Li estis ĉefgvidisto de karavanoj kaj antaŭ nelonge li pereis dum vojaĝo tra la dezerto, defendante la varojn de Mansur kontraŭ rabistoj. Pro la naskiĝo de sia filo Mansur estis tiom feliĉa, ke li diris al la patrino de Abdalah: „Omar kaj Abdalah ricevu kune sian edukon, ili estu fratoj kaj amikoj dum sia tuta vivo.”

Pri tiu deziro li baldaŭ pentis. Ĉar, kio okazis? Mansur estis tre superstiĉa. Li demandis al maljuna derviŝo (= almozpetanta, mahometana monaĥo) pri la estonteco de sia filo kaj tiu monaĥo diris: „Lia plej bona amiko estos lia plej granda malamiko”. Kiel Mansur povos defendi sian infanon kontraŭ tiu malamiko?

Por granda monsumo la derviŝo permesis al Mansur esprimi tri dezirojn, kiuj certe realiĝos. Kaj Mansur deziris: unue, ke lia filo estu dum la tuta vivo riĉa; due, li restu ĉiam tutsana kaj, trie, li amu neniun krom sin mem. Tiel li havos neniun amikon kaj do ne povos okazi, ke lia plej bona amiko fariĝos lia plej granda malamiko.

Kiam la derviŝo foriris de Mansur, ankaŭ la patrino de Abdalah venis al li kun peto. Sed, ĉar ŝi estis nur malriĉa virino, ŝi ne povis pagi ion. Ĉu ŝi do deziras riĉecon por sia filo? „Ne,” ŝi diris, „tion mi ne volas. Li fariĝos honesta viro, kia la patro, sed kion mi por li petas, tio estas, ke li fariĝu tutfeliĉa sur la tero.”

„Virta kaj feliĉa!” diris la derviŝo, kaj li ridetis en stranga maniero, „kaj tion vi petas de mi? Bona virino, ĝi estas la kvarfolia trifolio, kiun vi deziras, sed depost Adamo neniu ĝin vidis. Tamen via filo ĝin serĉu: se li ĝin trovos, estu certa, ke al li nenio plu mankos.”

La derviŝo foriris kaj neniam oni revidis lin. Ŝajnis, ke la tri deziroj por Omar realiĝis: li fariĝis tre ruza komercisto, pli kaj pli riĉiĝis, restis sana kaj amis nenium krom sin mem, eĉ ne la patron. Kiam tiu ĉi homo mortis, kun multe da pento pri sia perdita vivo, li kuŝis soleca sur la lito: dume lia sola infano komercis por gajni monon. Kaj kiam la patro estis mortinta, Omar sin konsolis per amasigo de novaj trezoroj.

Tutalie Abdalah fartis. Lia patrino kunprenis lin al la dezerto por ke li fariĝu tie inter siaj samgentanoj, la beduenoj, brava kaj honesta homo. Same kiel la patro li iĝis karavangvidisto kaj gardisto. La komercaĵoj, konfeditaj al lia zorgo, ĉiam sekure trapasis la dezerton. Liaj obeemaj kaj kuraĝaj viroj sentis respekton kaj admiron kaj amon por li. Kaj inter la rabistoj lia nomo estis timata.

Tamen Abdalah ne estis feliĉa. Lia patrino rakontis al li pri la kvarfolia trifolio kaj li deziregis aŭdi pli pri ĝi. „Via filo ĝin serĉu,” la derviŝo estis dirinta, sed kie li serĉu? Plurfoje Abdalah demandis pri ĝi al saĝaj kaj instruitaj viroj, kiujn li ekkonis inter la karavanojaĝantoj. Tamen neniu povis informi lin, ĝis kiam en iu tago griza israelido rakontis al li jenan malnovan legendon.

Kiam Eva estis forpelata el la Paradizo, ŝi antaŭe deŝiris malgrandan kreskaĵon por rememorigi al si la agrablan lokon, kiun ŝi neniam revidos. Ĝi estis la kvarfolia trifolio, la plej bela kreskaĵo el la edeno: unu folio estis ruĝa kiel kupro, alia estis blanka kiel arĝento, tria estis flava kiel oro, kaj la lasta brilis kiel diamanto.

Prenante la juvelon, Eva tuj fermis la manon por ne perdi ĝin. Sed ĉe la elirejo de la Paradizo la scivolemo superregis ŝin. Dum momento ŝi intencis rigardi ĝin. Sed pro iu subita ektimo ŝia mano ektremis: la diamanta folieto refalis en la Paradizon kaj la tri aliajn la vento forportis al la tero. Kie ili falis? Nur Dio scias.

Abdalah certe kredis pri la vereco de ĉi tiu legendo. Li nun ja

scias ion. La kvarfolia trifolio iam ekzistis. Kvankam la diamanta folio falis en la Paradizon, tamen la tri aliaj folioj venis sur la teron. Ilin li intencas serĉi. Sed kie?

La sama israelido, kiu konigis al li la legendon, ankoraŭ ion alian komunikis. Antaŭ multaj jaroj iu princino fosigis ĉi tie putojn. Per tio ŝi faris bonon, ne nur al la loĝantoj de ĉi tiu regiono, sed ankaŭ al la vojaĝantoj tra la dezerto.

Ja en dezerto estas nenio pli bona ol akvo. Pro la sekeco ĉio estas malfekunda kaj sen kreskaĵoj. Sed kiam elŝprucas akvo, tuj la vegetaĵoj sekvas. Jam baldaŭ la verdaĵo kovras la teron, floroj floras kaj palmoj leviĝas. Tia ĝardeno meze en la dezerto nomiĝas oazo.

Ĉi tie ne estis vera oazo, sed kreskis tamen iom da herbo, en kiu la ŝafoj povis paŝtiĝi kaj ankaŭ estis tie arbareto. El tio oni povus konkludi, ke ĉi tie estas akvo en la tero, sed tamen — neniu sciis ion pri tiuj putoj. Certe ili ŝtopiĝis antaŭ memoreblaj tempoj.

Nek Abdalah, nek iu el liaj parencoj, nek iu el lia gento iam aŭdis, ke ĉi tie antaŭe ekzistis putoj. Kaj ili tiom kutimiĝis vidi ĉi tiun kreskaĵaron sen akvo, ke al neniu el ili iam venis la penso serĉi malnovajn putojn ĉiloke.

Ankoraŭ la israelido rakontis, ke tiu princino pro amo al siaj kunhomoj fosigis la putojn. Kaj li aldonis : Ŝi faris pli multe por sia popolo ol multaj militeroj. En la milito fluas sango, la edzoj, la patroj kaj la filoj estas mortigataj kaj postrestas funebrantaj vidvinoj kaj orfoj kaj plorantaj patrinoj. Sed tiu ĉi princino estis nur beno por sia lando. Bonege estas, kiam ni per nia vivo kaj nia laboro estas beno por aliaj homoj.

Abdalah volis sekvi la ekzempon de la nobla princino, kaj post la foriro de la israelido li jam baldaŭ komencis fosi. Lia onklo Hafiz fidele helpis lin. Li ĉeestis la interparolojn kun la saĝa kaj multscia judo kaj li tre amis sian nevon. Kune ili do eklaboris. Sed ili ne supozis, ke ili spertos tiom multe da malfacilaĵoj.

Pli ol unu monaton ili fosadis, tamen neniom progresis. Ĉiufoje la sablo refalis, la nokto neniigis la laboron de la tago. Kaj krome la aliaj samgentanoj daŭre mokis pri ili. Ankaŭ la patrino de Abdalah opiniis, ke ŝia filo sin allasas al stulta ideo; ŝi ne komprenis, ke ŝia frato eĉ helpas en tio. Hafiz fine ne plu povis elteni ĉi tion. Li ĉesigis tiun laboron, kiu alportis al li nur elreviĝon kaj mokon. Sed Abdalah estis per nenio senkuraĝigebla. Kaj du tutajn monatojn li persistis.

En la dektria tago de la tria monato la puto havis profundecon de tridek ulnoj. Kaj ankoraŭ neniom da akvo. „Deturnu la stultan knabon de sia ideo,” diris la patrino al sia frato, „estas hontige, ke li tiel foruzas siajn tempon kaj forton por tia senutila laboro.”

Hafiz iris al la puto, kuŝiĝis sur la teron kaj vokis en la puton. Sed lia nevo eĉ ne aŭdis liajn vortojn. „Onklo,” li vokis, „ĉar vi ja estas tie, vi bonvolu suprentiri la korbon kun sablo, kaj mi povos daŭrigi la fosadon.”

„Stultulo!” diris Hafiz, ĉu vi eĉ ne plu aŭskultas la konsilojn de via onklo kaj la avertojn de via bona patrino?”

„Patro, patro!” subite ekkriis Abdalah, „la akvo venas! Mi aŭdas ĝin! Helpu, helpu! Suprenigu la korbon, aŭ mi estos perdita!”

Hafiz aŭdis la helpkrion, li tiris per ĉiuj fortoj kaj feliĉe li ankoraŭ ĝustatempe suprenigis sian nevon. Malseka ĝis la talio, kovrite per ŝlimo, kaj tute senkonscia Abdalah kuŝis ĉe la putorando, kiam la akvo bolante kaj ŝaŭmante suprenvenis. Tri metrojn de la tersurfaco ĝi haltis. Se Hafiz estus veninta kvin minutojn poste, aŭ se li estus ne tiom forta, Abdalah estus sufokinta de la akvo profunde en la tero. Sed dank' al Dio li atingis sian celon kaj vivis ankoraŭ.

Nun ĉiuj, kiuj antaŭe mokis pri Abdalah, laŭdis lin. Sed la nobla bedueno neniam atentis la mokon kaj nun ankaŭ la laŭdon ignoris. Kiam la tuta gento estis kunveninta ĉe la puto, li plenigis kruĉon per akvo kaj ĉiu laŭvice trinkis el ĝi. La akvo estis freŝa kaj bongusta. Ĉiuj estis tre feliĉaj. Nur la lastan gluton Abdalah mem prenis. Sed, malplenigante la kruĉon, li sentis ion malvarman, malmolan en la buŝo. Ĝi estis eta, metala folieto, suprenportita de la akvo.

„Kio ĝi estas, onklo?” demandis Abdalah al Hafiz. „Ĉu la tero ĉiloke enhavus kupron?”

„Ho, mia filo,” diris Hafiz, „gardu ĝin, ĝi estas la plej kara trezoro. Dio sendas al vi la rekompencon por via kuraĝo kaj via laboro. Ĉu vi ne vidas, ke ĝi estas parto de la trifolio? La tero mem malfermiĝis, por doni al vi ĉi tiun paradizan folieton.”

Abdalah estis tre kortuŝita. Li dankis Dion, kiu en tia mirakla maniero plenumis lian peton. Sed la maljuna Hafiz bone komprenis: kiu deziras la kvarfolian trifolion, la paradizan kreskaĵon, tiu ne pensu pri si mem, sed dediĉu sian vivon al la servo por aliaj homoj. En tio estas trovebla la plej alta feliĉo.

(Daŭrigota.)


EKSKURSO.

Tuta serio da lumbildoj preparis nin por la granda ekskurso, kiun ni faros kun ĉiuj partoprenantoj de la Internacia Junularkunveno en Groet en aŭgusto de tiu ĉi jaro. Verdire la bildoj ne multe vekis ĉe mi intereson por la ekskurso, ĉar jam tre multe mi ekskursis dum mia vivo. Tamen, mi intencis certe partopreni, ĉar mi konis la gajan popoleon kun kiu mi vojaĝos, do... estis memkompreneble, ke mi iros.

Frue ni vekiĝis kaj preparis nin por la longa veturo : ducent kilometrojn ni veturos, tio estas la larĝo de tuta Nederlando, kaj ni vizitos multajn vilaĝojn. Ĉiu alportis siajn bezonaĵojn, ĉar dum tia veturado oni bezonas multon. Precipe muzikiloj estis bonvenaj kaj same fotoaparatoj.

Ni manĝis sanige kaj plenigis la restintajn spacetojn en niaj stomakoj per bongusta lakto kaj kun kontenta interna sento nia Kunveno plenigis ses aŭtobusojn kaj du aŭtomobilojn. Belaj propagando-tukoj kaj esperanto-flagoj ornamis la veturilojn ekstere; el interno sonis la kantoj de la vojaĝantoj. Ifoje oni informis min pri la holanda klimato, kiu konsistas el naŭ monatoj da pluvo kaj tri monatoj da malbona vetero. Tiu kalkulado ne estis ĝusta por la jaro 1938. Ni havis belegan veteron dum nia restado kaj precipe dum nia ekskursego.

Ni preteriris la vilaĝojn Schoorl kaj Bergen, kaj baldaŭ ni estis en Alkmaar, kie ni ne haltis, ĉar la unua haltejo estos Stompeteren. Tie ni vizitis laktaĵofabrikon. Estis interese sed tre varme, ĉar oni kondukis nin al parto de la fabriko, kie oni faras laktopulvoron, tio estas sekigita lakto. Se oni aldonas akvon al tia pulvoro ĝi fariĝas lakto denove. Ni vidis, kiel oni faras buteron, kaj, kio estis pli interesa, kiel oni faras fromaĝojn. Estis al mi malfacile foriri el tiu tre interesa fabriko, kaj certe ankaŭ pro tio, ke multaj laboristoj parolis esperanton kaj klarigis al ni multon per nia komuna lingvo. Ni estis tre dankaj al la direkcio kaj al la laboristoj kaj mi esperas, ke niaj amikoj en Stompeteren volas ankoraŭ akcepti nian dankon. Tiu danko cetere havas ankaŭ materian flankon, ĉar ni ricevis el la fabriko tri kaldronojn kun bongusta lakto, kiuj estis tre bonvenaj.

La aŭtobusoj rapide forportis nin al Midden-Beemster, kie la karavano haltis. Kelkaj nederlandanoj klarigis, ke ni estas je la plej malalta punkto de la poldero Beemster, kvar metrojn sub la nivelo de la maro. Kaj tiu maro estas du horojn dekstre kaj du horojn maldekstre, ĉar ni troviĝas inter du maroj. Tiu komuniko tamen ne maltrankviligis nin, ĉar ni estis en humoro brilega. Do, antaŭen al Edam, kie ni promenis iom tro longe kaj maltrafis la aŭtobusojn, sed retrovis ilin post dek minutoj. Niaj stomakoj avertis, ke la mezo de la tago alproksimiĝas. Tamen ni devis iom pacienci kaj veturi al Volendam, la famkonata fiŝista kaj fremdula urbeto. Sur la mardigo akceptis nin kelkaj enloĝantoj de Volendam; ili surhavis la mondkonatan kostumon de la tieaj fiŝkaptistoj. Ne facile mi forgesos la momenton, kiam mi parolis kun tiuj homoj. Ĉiu konas la belegajn vestaĵojn de tiu regiono, sed malmultaj konas la homojn, kiuj sin vestas per tiaj kostumoj. Ankoraŭ ili staras antaŭ miaj okuloj, la tri junaj viroj, kiuj akceptis nin en Volendam. Longaj kaj sveltaj ili marŝis sur la digo, la kapojn ili tenis fiere



sur la larĝaj ŝultroj. Tiel ili marŝis trankvile al ni kaj salutis nin en Esperanto. Ha, tiu momento! Ne plu ili estis fremdaj al ni; en tiuj belaj, sed nekutimaj kostumoj troviĝis homoj, parolantaj nian lingvon. Ili demetis la belajn ĉapojn kaj ridetante etendis al ni la manojn. Kiom da ĝojo plenigis niajn korojn! Tiuj homoj ne demandis el kiu lando ni venis; por ili sufiĉis, ke ni montras intereson por la loko, kie ili loĝas kaj ke ni parolas esperanton. Simple kaj senafekte ili parolis kun ni pri la aferoj, kiuj estas por ili la ĉiutagaj, sed kiuj por ni estis tute novaj. Eĉ ili kondukis nin tra dometo en kiu loĝis la gepatroj de unu el ili. Tia domo nepre devas esti la plezuro kaj la fiero de la dommastrino, sed sendube tia amaso da objektoj en la domo estas fonto de eterna atento kaj purigado. La stratoj kaj pontoj en Volendam estas mallarĝaj kaj puraj; la infanoj portas vestaĵojn kiajn la plenaĝuloj. Estas kvazaŭ oni vidas marŝantajn pupojn. Vidante la loĝantojn de Volendam en tiuj stratetoj oni vole ne vole pensas pri ornamitaj stratoj. Kaj tre agrable estis, ke ni povis paroli kun kelkaj el tiuj homoj. Tro baldaŭ venis la momento por adiaŭi. Sur placo ni grupiĝis ĉirkaŭ la esperantoflago de la Volendamanoj kaj por esprimi niajn dankon kaj kontenton ni kantis „La Espero”.

La aŭtobusoj forrapidis tra vilaĝoj kaj ni atingis la urbeton

Hoorn, kie ni tamen ne restis. Ĉiam antaŭen. En Bovenkarspel ni haltis kaj vizitis la vendejon de bulboj. Tie staris en korboj milionoj da bulboj kiujn oni sendas ĉien en la mondo. Jam mi skribis, ke la afabla posedanto de la bulbo-kulturejo permesis al ni lude aĉeti bulbojn, kiujn kelkaj efektive ricevis. Estis instrue kaj agrable en tiu vendejo, sed jam nin atendis la plataj boatoj por transporti nin al Enkhuizen. La veturado per la boatoj estis fonto de ĝojo kaj aventuroj, ĉar la kanaloj estis malprofundaj kaj la motorboatoj tirantaj nin, ne povis ĉiam eviti malprofundaĵon. Ofte ni ekstaris en la boatoj por admiri la belegajn florojn, kiujn ni preterveturis. Estis tutaj amasoj da floroj ĉiuspecaj, kiujn oni kulturas tie sur la vastaj kampoj. Kia pejzaĝo ! Floroj en senfinaj vicoj kaj en ĉiuj koloroj. Ni albordiĝis en Enkhuizen, malnova urbeto apud la Zuiderzee (nun lago, pro la fermdigo). Ni manĝis panon kaj trinkis la lakton el Stompetoren. Baldaŭ ni forlasis Enkhuizen, ĉar nin atendis longa veturado tra la sekigita Wieringer-lago. Iam ĝi estis maro, nun ĝi estas fruktodona kampo. Tre bela, sed iom monotona. En la aŭtobusoj oni tamen ne enuis. La infanoj kantis, instruis lertaĵojn unu al la alia kaj parolis pri la nova angla (usona) danco „Lambeth Walk”. Lertulo tradukis la anglan tekston esperanten kaj gaje sonis el la aŭtobusoj : „Venu al la Lambeth ter’, en mateno kaj vesper’ ”. Precipe la vorton „hoj” ĉe la fino de la kanto, oni kantis forte; kaj ĉiam denove oni kantis. Ankaŭ la ĉenkantoj estis laŭgustaj. Kaj ĝojiga novaĵo trakuris tra la aŭtobusoj. La firmo Bakker el Enkhuizen sendos al ni donace mil bulbojn por divido inter la infanoj de la Junularkunveno. Bonege. Ni ĉiuj portos memoraĵon hejmen kaj ni ofte pensos ankoraŭ pri tiu interesa ekskurso.

Fine ni atingis la grandegan fermdigon, kiu apartigas la Nordan Maron de la Zuiderzee (nun IJsel-lago). La grandega digo estas 30 kilometrojn longa. Oni sentas admiron por la konstruintoj de tiu digo, kiun ili konstruis tra maro, iafoje sufiĉe furioza.

Antaŭen ni denove iris. La suno malleviĝis, la vespero alvenas. Ni rapide veturas al Petten kaj atingas post kvaronhoro Groet, nian dormejon. Lacaj ni estas kaj kontentaj. Ofte, tre ofte ni rememoros pri tiu ekskurso. Kaj senpacience mi atendas la filmon de la Junularkunveno, kiu enhavas laŭ onidiro multajn bildojn de tiu varia kaj neforgesebla veturado. Kun multe da ĝojo ni vidos en la klubkunvenejo la filmon. Dum malvarma vintra tempo ĝi redonos al ni parton de la ĝuo kaj ĝojo de nia Junularkunveno.

Ĝis revido sur la filmo !

ĈEESTINTO.

Peto.

S.ro Bakker, kiu tiom malavare donacis al la vizitantoj de la Int. Junularkunveno flor-bulbojn, kompreneble tre interesiĝas pri la sukceso. Do, se viaj bulboj havos florojn bonvolu raporti al li!
Adreso : N. V. P. Bakker Mzn., Enkhuizen (N.H.), Ned.



La partoprenantoj en la „Internacia Junularkunveno” (10-17 Aŭg. 1938),
atendantaj la antikvan vagonaron al Alkmaar.

(La kliŝon afable disponigis „La Praktiko”)


NIA JUNULARKUNVENO (GROET 1938).

Jam longe antaŭ la komenco	Mi poste spertis grandan ĝojon
De nia Junularkunveno	Dum nia Junularkunveno.
Vivadis ĝi en mia penso,	Amikojn trovis, ĉiun fojon
La bela Junularkunveno!	En nia Junularkunveno!

Nur tre rapide estis for, ho!
La bela Junularkunveno.
La ĝojo restos en la koro
Pro nia Junularkunveno!

Amsterdam Ned.).

Mary KRYT (15 jara).



komunikoj

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : S.ro M. v. d. Horst, Johan Idastraat 32, Rotterdam (Ned.), ĝironumero 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Instruisto, Koedijk; ĝironumero 310334.

La filmo pri la Kunveno en Groet : Ĝis nun ĝi estas prezentita en : Schoorl, Koedijk kaj West-Graafdiijk La unua prezentado okazis en Schoorl, kaj — tre bedaŭrinde — dumtage. Kvankam oni penis mallumigi la salonon, oni ne sufiĉe sukcesis. Kompreneble la bildoj pro tio malklariĝis, kaj multaj ĉeestantoj jam seniluziiĝis. La dua prezentado okazis en Koedijk, en plenplena salono. Tiam la sukceso estis grandega. Tie klare montriĝis, kiom belaj kaj klaraj ĉiuj bildoj estas. Ankaŭ en West-Graafdiijk la sukceso estis granda, kaj la plej bona reklamo certe estas, ke ĉiuj ĉeestantoj, ankaŭ la ne-esperantistoj, petegis : „Montru ĝin denove!” Montriĝas do, ke la filmo interesas ĉiujn, junajn kaj maljunajn, esperantistojn kaj ne-esperantistojn.

S.ro Holland en Anglio farigis kopion de la filmo kaj donacis ĝin al la Brita Esperanto-Movado. Bonega faro! Espereble la anglaj grupoj multe uzos la modernan propagandilon. Kiu deziras montri la filmon en Anglio, do turnu sin al : S.ro J. Holland, 61 Vandyke Road, Leighton Buzzard, Beds.

Kiu deziras lui la filmon (luprezco 2 guld. por unu vespero, por ĉiu sekvonta tago po 1 guld.), turnu sin baldaŭ al S.ro Schut, por ke li havu tempon bone aranĝi ĝian rondvojaĝon. Al la sama adreso oni povas lupeti belegajn propagandafiŝojn, sufiĉe grandaj, por pendigi malantaŭ kelkaj fenestroj. Luprezco nur la sendkostoj.

Filmaparato 8 milimetra estas facile akirebla en ĉiu urbo.

Propagandartikoloj : Al ĉiu ni petas sendi gazetojn (ĵurnalojn) kun artikoloj pri T. J. O. al la sekretario (Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.).

La venonta Kunveno en Belgio : Jam nun ekŝparu por la venonta kunveno en Belgio, en aŭgusto 1939. La kostoj estos por la tuta semajno maksimume 7 guldenoj. En Nederlando ni aranĝos aŭtobuskaravanon. La grupoj nepre formu ŝparkasojn !

Glumarko : T. J. O. eldonis belan glumarkon (terglobo ĉirkaŭita per la vortoj „Tutmonda Junularorganizo”). La prezo estas 100 por 20 cendoj. Mendu ilin al „La Juna Vivo”.

Statuto : Ni presigis la statuton sur faldfolio, kiu estas samtempe atesto de membreco. Ĉiu membro ricevos ĝin.

Simpatuloj : En Nederlando ni varbas simpatulojn al T. J. O. Ili pagas 0,40 guld. (minimume) kaj ricevas specialan nederlandlingvan ateston kiel kvitancon.

Kursoj : En jenaj lokoj oni starigis kursojn por infanoj kun entute 696 partoprenantoj : Heilo, Gouda, Amsterdam, Koedijk, Groet, Veendam, Bergen, Leiden (Ned.); Lyon, Sain Bel (Franc.); Ashford, Birmingham, Hemsworth, Northfield (Angl.). En ĉiuj oni uzas « Internacia Lernolibreto'n ».

T. J. O.-Sekcioj : Sekciojn de T. J. O. ni fondis en Laren, Gouda, Koedijk, Middelle (Ned.); Bishop Auckland (Angl.); Besançon (Franc.); Wemeldinge (Ned.).

Donacoj por T. J. O. : Leerdam Esp.-ista Unuiĝo : guld. 2.50; Infangrupo „La Kampfloroj” en West-Grafdijk : 1 guld.; S.ino Verheyen, Amsterdam : 1 guld.; S.ino H. Kool, West-Grafdijk : 1 guld.; Ges.roj v. Vlaardingen en Rotterdam : 0.60 guld.; S.ro J. Holland, Leighton Buzzard (Anglujo) : f 5.00.

Propagandu, uzante la specialan T. J. O.-poŝtpaperon.

Mendu T. J. O.-korespondpaketon, prezo : 2 guld., enhavanta : 100 bonkvalitajn kovertojn (verde presitaj), 100 foliojn da poŝtpapero, 100 glumarkojn. Specimeno de la supra paketo (enhavanta 5 kovertojn, 5 foliojn da poŝtpapero, 10 glumarkojn) kostas unu respondkupanon aŭ 15 cendojn. Mendojn oni povas sendi al „La Juna Vivo”.



Junulargrupo en Laren (Ned.).

Dekstre staras nia fervora kunlaborantino, F.ino Kieft.

(La kliŝon afable disponigis „La Praktiko”)

Por komencantoj.

ĈE LA BARBIRO.

En barbira salono sidas malgranda Hans, kaj atendas ke oni tondu liajn harojn.

La barbiro demandas lin : „Kiel vi deziras ke mi tondu viajn harojn?”

„Tiel kiel ĉe mia instruisto. Supre neniajn kaj malantaŭe nur kelkajn.

LA FRATINETO.

Friĉjo nun tre ĝojas kaj estas fiera pri la nova malgranda fratineteto, kiun la cikonio alportis al li.

Iu demandas al li : „Ĉu la fratineteto jam povas kuri?”

„Ho ne,” respondas Friĉjo, „tion ŝi ne povas, sed krurojn ŝi jam havas!”

(Rerakontis S.ino P. JAHN-ATANASOVA.)

IMITINDA IDEO.

Iu sinjoro en Nov-Jorko elpensis ion originalan. Li nome presigis sian telefon-numeron sur la tenilo de sia pluvombrelo.

Kiam li forgesis kunporti tiun utilan objekton, ĝenerale post mallonga tempo oni telefone sciigas al li, kion li perdis.

Ĉar la koncerna persono estas tre forgesema, oni jam sepfoje redonis al li la saman pluvombrelon.

(El Interligilo de P. T. T.)

VIDPUNKTO DE LERNANTO.

„Paĉjo, ne ekzistas justeco en la mondo!”

„Kiel vi povas tion diri, mia fileto?”

„Ĉar la sinjoro instruisto ricevas la salajron, sed ni devas fari la laboron.”

(El „La Interna Ideo”.)

RICULOJ.

De kelka tempo oni instruas la malgrandan Hans pri la biblio. Iun tagon oni rakontas al li, kiel Abrahamo faris longajn vojaĝojn sur kamelo.

„Kiom riĉaj estis la homoj en tiu tempo!” krias Hans.

„Ĉu riĉaj, knabeto?”

„Jes, ĉar kiam mi en la zoologia ĝardeno rajdas nur treege malgrandan distancon sur kamelo, mi jam devas pagi dudek kvin centojn !”

LA KLERA KARLO.

La instruisto instruis la infanojn pri frakcioj. Por kontroli ĉu ili komprenis, li demandas al unu el la knaboj :

„Diru al mi, kio estas la diferenco inter duono kaj kvar okonoj?”

La knabo ne tuj respondas, kaj por iom helpi la instruisto diras : „Se vi povus elekti inter duona oranĝo kaj kvar okonoj de oranĝo, kion vi tiam elektus?”

„Ne estas diferenco,” fine respondas la knabo, kaj la instruisto diras kontente : „Tre bone”.

Sed nun la malgranda Karlo levas fingron, kaj la instruisto demandas al li : „Ĉu vi elektus alie?”

Karlo respondas fervore : „Mi certe prenis la duonan oranĝon!”

„Kial?”

„Ĉar per tiuj okonoj mi perdus multe da suko!”

PRI TIO NE EKZISTAS DUBO.

Viro instruis al sia papago jenan frazon : „Pri tio ne ekzistas dubo”. Tiam li iris kun ĝi al vendejo. Baldaŭ riĉa sinjoro petis informon pri la prezo. La posedanto de la birdo diris : 15 guldenoj. Tio estis multa. La aĉetanto rigardis la papagon kaj diris :

„Ĉu vi tiom valoras?”

„Pri tio ne ekzistas dubo”, la besto tuj respondis.

Mirante pri tiom da saĝo, la sinjoro aĉetis la papagon.

Sed baldaŭ montriĝis, ke la birdo nenion povis diri krom tiu frazeto. Kun bedaŭro la posedanto nun rigardis la multekostan beston, kaj malkontente li diris : „Mi ja estis freneza, kiam mi aĉetis vin!”

„Pri tio ne ekzistas dubo!” respondis la papago.

Kial la viro instruis la papagon? Ĉu la besto lernis multajn frazojn? Kio okazis sur la vendejo? Ĉu la posedanto petis multan monon? Ĉu la sinjoro tuj aĉetis la birdon? Ĉu la birdo helpis ĉe la vendo? Kial la sinjoro fine aĉetis la papagon? Ĉu la papago daŭre kontentigis la sinjoron? Kio okazis? Ĉu la birdo sprite respondis?

LA VIRINSABLAJO.

Tre riĉa estis la urbo Stavoren en Frislando (Nederlando). Ĉio brilis pro oro kaj arĝento. La plej riĉa el ĉiuj estis la vidvino de komercisto. Ŝiaj ŝipoj veturis sur ĉiuj maroj.

Iun tagon ŝi vokis unu el siaj ŝipestroj kaj ordonis lin havigi al ŝi plenŝipon de la plej valora, kio ekzistas sur la tero.

La ŝipestro plenumis sian devon. Li alportis la plej bonan tritikon, kiun li povis akiri sur la Orienta Maro.

Ion tian la fiera komercista edzino tamen ne deziris.

„Je kiu flanko vi ŝarĝis la ŝipon?” ŝi demandis.

„Je la maldekstra flanko.”

„Jetu tiun aĉaĵon je la dekstra flanko en la maron!”

Averta vorto ne efikis, nek peto por pano.

„Pri tiu ago vi poste pentos!” ĉagrene diris la griza ŝipestro.

Je tiuj vortoj la dorlotita virino ankoraŭ pli furioziĝis. Ŝi tiris oran ringon de sia fingro, ĵetis ĝin malproksime en la maron, kaj kriis : „Same kiel tiu ringo neniam revenos al mi, mi neniam pentos pri mia ago!”

Oni daŭrigis la luksan vivmanieron kaj forĝesis la forĵetitan tritikon.

Iun tagon tamen unu el la servistoj de la riĉa vidvino montris al ŝi ringon, kiun li trovis en la stomako de fiŝo. Vidante la objekton ŝi treege ektimis, ĉar estis la ringo, kiun ŝi ĵetis en la maron. Subite ekkomencis ventegi, kaj freneza pro timo la virino kuris eksteren. Sur la strato ŝi renkontis homojn, kiuj rakontis al ŝi, ke pro uragano multaj el ŝiaj ŝipoj pereis.

De tiu momento komenciĝis ŝia malfeliĉo, kaj la malfeliĉo de la tuta urbo. La haveno malprofundiĝis. La riĉa virino malriĉiĝis, la fiera urbo fariĝis sensignifa.

Sur la loko, kie oni ĵetis la grenon en la maron, ankoraŭ nun kreskas trunketoj super la akvo, sed estas trunketoj kun malplenaj spikoj.

Kaj la sablaĵo, sur kiu ili kreskas, nomiĝas, kiel eterna averto, „La Virinsablaĵo”.

Kie kuŝas la urbo Stavoren? Ĉu tiu urbo ankoraŭ estas riĉa? Kiu estis la plej riĉa en Stavoren? Ĉu ŝi mem havis ŝipojn? Ĉu la vidvino estis kontenta kun siaj trezoroj? Kion ŝi ordonis al unu el siaj ŝipestroj? Ĉu la ŝipestro plenumis sian devon? Kion li alportis? Ĉu li kontentigis la sinjorinon? Kie li akiris la tritikon? Ĉu la virino komprenis la valoron de la tritiko? Kio okazis? Ĉu ĉiuj homoj estis kontentaj pri ŝia faro? Kiu avertis ŝin? Ĉu tio helpis? Kion la

riĉulino diris? Ĉu ŝi estis saĝa? Ĉu ŝi neniam ricevis la ringon? Kiu trovis ĝin? Kia ŝi tiam estis? Kio okazis?

Tasko :

1. Kopiu kaj traduku en vian gepatran lingvon ĉiujn rakontojn sub la rubriko „Por komencantoj”.
2. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de : „La klera Karlo”, „Riĉuloj”, „Imitinda Ideo”.
3. Lerne parkere : „Ĉe la barbiro”, „La fratineto”, „Vidpunkto de lernanto”.

? ENIGMOJ

Serĉu dek unu kvinliterajn vortojn, kies unuaj literoj, legataj de supre malsupren signifas : bela, pacama, gastama loko.

La vortoj signifas sinsekve : 1. paradizon; 2. ĉielan korpon; 3. akvon; 4. malgrandetaĵon; 5. ornamaĵon; 6. malintelligentan beston; 7. homon de nigra raso; 8. translokeblean loĝejon; 9. profite uzeblan; 10. nomon de relegifondinto; 11. parton de la kapo. T. B. B.

Solvojn ni akceptos ĝis 1 decembro. Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn.

LA SOLVOJ EL No 2-3.

zeBro
blUzo
liTro
biEro
veRda
leOno

Korko — salti — tiam — elasta — lito.
La proverbo estas : Kia la semo, tia la rikolto.

La premiojn gajnis : F. J. Lindsen en Rotterdam (Ned.) kaj J. P. Geus en Koedijk (Ned.).

LA REZULTO DE LA LOTUMADO, PROFITE AL LA INT. JUNULARKUNVENO EN GROET.

Pro manko de spaco ne eblas enpresigi ĉiujn premiojn, ni nur mencias la 2 ĉefpremiojn.

La biciklon gajnis S.ro Verduin en Bodegraven (Ned.) je No 3155.

La seĝegon gajnis S.ro Kamminga en Haarlem (Ned.) je No 2759.

Plenan liston oni povas peti al „La Juna Vivo”, West-Graafdiijk. Prezo : 5 cendoj.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Francujo : S.ro A. Badinier (17 jara), 8 rue de l'Eperon, Orléans (Loiret), dez. kor. kaj interŝ. poŝtmarkojn en la tuta mondo.

Germanujo : S.ro A. Bierman, Wuppertal-B., Raŭental 68, deziras interŝangi poŝtmarkojn. A franku filatele. Valoras ĉiam.

Latvujo : I. Krastinš (laboristo), Rembates pag. Arnukalnos C. Lielvardi, deziras korespondi. Respondo garantiata.

Nederlando : Lerdama Esperantista Unuiĝo aranĝos letervesperon la 16-an de decembro. Skribu multnombre al la sekretario, S.ro J. Kars, Meent 35, Leerdam. Ĉiu rivecos respondon.

Nederlando : 2 junuloj, 17 kaj 20 jaraĵ dez. kor. kun gejunuloj en la tuta mondo. Skribu al : Jb. Berkhout, Rijksweg 50, de Kooy, Julianadorp.

Nederlando : S.ro J. Smit-Roeters, Hendrik Sorchstr. 43, Rotterdam-W., dez. kor. k. eksterl. gesamideanoj. Ne kol. poŝtm. Respondo garantiata.

Polujo : S.ro M. Wachenhauser dez. kor. k. samideanoj en ĉ. l. pri sociaj k. kulturtemoj (ankaŭ lingvistiko). Warszawa 41, ul. Stawki 18/71.

Svisujo : 8 infanoj, proks. 14 jaraĵ, lernantaj esp. dez. kor. kun junuloj en la tuta mondo. Kinderheim Traugott, Herrliberg (Zch).

Francujo : F.ino Huart, M. T. Marchiennes (Nord) petas F.ino Winifride Stone, St. Aidans School, Anglujo, sendi sian ĝustan adreson.

Francujo : S.ro Bot Henri, rue St. Armand, Marchiennes, Nord, deziras korespondi kun 16-17 jaraĵaj fraŭlinoj.

Francujo : S.ro Sohnrey Marceau, au Ballodrome, Marchiennes (Nord), deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri politika situacio.

Francujo : F.ino Helle H., Bruille (Nord), 18 jara, dez. kor. kun samjaraĵaj gefraŭloj kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

Francujo : Fenain (Nord), 10 senetir de Somain, 2 esperantistoj 15-19 jaraĵ dez. kor. kun gefraŭloj en ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj.

Nederlando : Kees Oeloff, Tjerk Hiddesstr. 5c., Leeuwarden, volas tre volonte korespondi kun geknaboj el ĉiuj landoj, precipe el Ameriko.

Nederlando : 18-jara presisto, W. J. P. Vermeulen, Vorstmanstraat 41, Gouda, deziras korespondi kun junuloj el la tuta mondo, pri diversaj temoj.

Francujo : 16-jara studento, Paul Nambride, école de Crau-Gevrier, près Annecy, Haute Savoie, dez. kor. kun gestudentoj de ĉ. l. Respondo certa.

Nederlando : Mi dez. interŝ. poŝtm. kun la tuta mondo. Posedas katalogon. Respondo garantiata. J. A. Bossinga, „Juliana-Oord”, Laren (N.H.).

Anglujo : Douglas C. Bills, 14 Green Place, Crayford, Kent, 17-jarulo, deziras korespondi kun gekamaradoj alilandaj.

Nederlando : S.ro A. Ottens, Woningbouw II 596, Emmer Compascuum, deziras kor. kun la tuta mondo pri ĉiu temo. Respondo garantiata.

Portugalujo : 22-jara fraŭlo, malsana en sanatorio, dez. kor. kun finoj en Danio, Belgio, Francio, A. F. Mordido, Sanatorio M. Gelfa, Minho.

ANONCETOJ.

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Scheldestraat 65, Amsterdam-Z.

INTERNACIA KANTARO „LA JUNA VIVO”, nepre necesa en ĉiu grupkunveno! La belaspekta libreto enhavas 34 kantojn kun muziknotoj. Praktika formato. Prezo po 35 cendoj; 2 ekz. por 50 cendoj.

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Libretoj 32-36 paĝoj po 0,35 guld. Serio 10 volumetoj 2,50 guld. La enhavo interesa, instrua, bonstila, speciale taŭga por daŭriga kurso. Kursgvidantoj rajtas peti specimenon. Mendebila al „La Juna Vivo”.

INTERNACIA LERNOLIBRETO „LA JUNA VIVO”, la plej taŭga kaj mal-kara lernilo por komenckursoj. Tre favoraj recenzoj. Kursgvidantoj petu specimenon! Prezo po 20 cendoj. Ĉe mendo de almenaŭ 20 ekz. la prezo estas po 16 c. plus afranko.

PETO!! S.ro P. H. Mooy, ĉefdel. IEL, Teunisbloemlaan 19, den Haag, nepre deziras posedi la plenan jarkoleton de „La Juna Vivo” '37/'38. Al li mankas la Noj : 1, 2-3, 6, 7, 8, 12. Kiu povas helpi lin? Li pretas pagi la afrankon.

BINDITAJ JARKOLEKTOJ „LA JUNA VIVO”. Tre taŭga materialo por komenc- kaj daŭrigkursoj. Prezo : Jark. '34/'35 : guld. 0,65, jarkolektoj '35/'36 kaj '36/'37 : po guld. 0,55. Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. la prezoj estas po 55 kaj 45 cendoj.

„GÖSTA BERLING”. Selma Lagerlöf, trad. Stellan Engholm. Famkonata verko, tradukita en 37 lingvojn. Prezo bind. guld. 3,75.

„INFANOJ DE BETLEHEM”. Selma Lagerlöf, trad. O. Frode. Unu el la plej belaj perloj en la tre fama kolekto „Kristlegendoj”. Prezo, broŝ.: 0,37½ guld.

„LA HOMAJ RASOJ DE LA MONDO”, originale verkita de R. Nordenstreng. Tre interesa, popularscienca pritrakto de la rasaj problemoj. Prezo, bind.: guld. 2,37½.

„TRA SOVAĜA KAMĈATKO”. Sten Bergman, trad. B. Gerdman. Tre vivoplene la sveda sciencisto rakontas pri siaj veturoj en Kamĉatko, akompanate nur de sia juna edzino. Prezo, bind.: guld. 3,—.

„PASKO”. A. Strindberg, trad. Stellan Engholm. Unu el la plej konataj kaj ŝatataj dramaj verkoj de la granda verkisto. Prezo : guld. 0,75.

ORNAMU VIAN SKRIBPAPERON PER LA BELA GLUMARKO DE T. J. O.

Presejo A. Hessens, Komedianteastraat, 12, Bruselo.